



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 1-a de Aprilo 2019

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Mikaelo Lineckij, Ŝlomo Ŝaĥar, Dror Gaon.

Protokolo de la pasinta kunsido (11-a de Marto 2019) – publikigota en la retejo.

1. Sciigoj

- a) Sukcesege estis elsendita la raportaĵo pri Esperanto en Israelo en kanalo 11, ankaŭ metita rete. Amri reklamis tra la E-mondo, venis multaj laŭdoj.
- b) La Jerusalema grupo kunvenis en Marto, estis 1 lernantino kaj 4 s-anoj partoprenantoj, Ĥaja telefone.
- c) Amri peris por Zachi Shiff restadon ĉe Oomoto en Aŭgusto por filmi. Ili entuziasme akceptis.

2. Dratverejo (Jehoŝua)

- a) Jehoŝua parolis kun la filino de la antaŭaj luantoj, ŝi konsentis peti la elektrokompanion fermi la elektron, ĉar ili ne plu loĝas tie.
- b) Amos vizitis la luanton, Ŝlomo parolis kun li telefone, promesis pagi “kiam li povos”.
- c) Dima, la luanto telefonis al Jehoŝua, kaj diris, ke sia telefono paneis, kaj li havas novan. Li diris ke li kolektis kelkilojn da sikloj kontante, kaj pretas pagi eventuale per poŝta ĝiro (ĉar la bankkonto estas blokita - מעוקל).

3. Oficejo (Amri)

- a) WE vendis la du oficejojn, ne plu aktualas por ni.
- b) Ĉu revivigi Recital (salono 25 m², oficejo 7.5m²), kvankam adv. Modan malfavoras?
- c) Nova: Yigal Alon 94 (turoj BE ALL), 5 minutoj de la trajnstacio Merkaz, 8/15 m², 300,000 NIS, prelegejo. [Evidentiĝis ke la prelegejo ne taŭgas, estas tre malgranda].
- ĉ) Jehoŝua kaj Ŝlomo: eble ni aĉetu magazenon por la libroj ĉe Jinon. Amri: tio forprenos de ni la ŝancon havi propran ejon.

4. Financoj (Ŝlomo)

- a) Ŝlomo anoncas: li devos veturi al studtago de la Registristo en majo. *Decido*: liaj elspezoj (vojaĝkosto) repagendas. *Aprobite jam en la marta kunsido!*
- b) Estas bezonata la listo de la ĝisdataj antaŭpagoj de eksterlandanoj por la IK al la ELI-konto ĉe UEA. Amri petos de Stanka.

5. Israela E-isto (Mikaelo, Amri)

- a) Mikaelo finis 28-paĝan n-ron 167, Gabi provlegis, Mikaelo produktis la version de PDF.
- b) Jehoŝua ankoraŭ ne finis ĝisdatigi la eksterlandajn abonantojn ĝis la IK.
- c) Mikaelo: IE printempa n-ro 2019 pretos ĝis la IK.
- ĉ) Amri kontaktos la presejon, ĝi presos la kovertojn kaj la bultenon kaj sendos al Mikaelo.

**6. IK-20 Eilat+Akaba** (Amri)

- a) Nuna stato: aliĝis 51, el ili 20 eksterlandanoj (tri eksterlandanoj nuligis, unu aliĝis).
- b) Amri ĝisdatigis la mendojn de la ĉambroj (Eilat, Akaba, PK).
- c) Amri konfirmis kun la hotelo en Akaba pri la prelegejo kaj la ĉambroj. Amri aĉetos dinarojn en pli oportuna kurzo ol en la limo, en Orienta Jerusalemo.
- ĉ) Amri dissendis detalan programon al ELI-membroj kaj al ĉiuj eksterlandaj aliĝintoj.
- d) Aliĝintoj post Eilat: Akaba - 20, PK Petra - 20, PK 18-21.3 - 16, PK 22-24.3 - 9.
- e) Pluraj eksterlandanoj antaŭpagis al Eli-konto ĉe UEA, unu eĉ la tutan sumon.

7. UEA kotizŝanĝo (Jehoŝua)

- a) Jehoŝua telefonis (?) al antaŭaj IM-oj. El ĉ. 65 IM-oj (plej multe en la kategorio MG, 8 DM-oj) ĝis nun remembriĝis: Eli BY, Luiza, Oded K, Gabi, Ariel Ŝvarc (TEJO), Tuvja Rosenberg, Ĥaja MJL, Miklaf, Cvi, David MA - donace 6+4. Ok delegitoj - antaŭe 30!
- b) Ĝis la fino de marto Jehoŝua verkos la protestan leteron al la Komitato kun la rezulto por la israela IM-aro (?)
- c) Jehoŝua telefonos (ĝis la IK) al Martin Shaffer por demandi pri....:
 - 1) La propono de Mark Fettes, por la transira jaro meti Israelon en la 4-a kategorio
 - 2) Pri la propono de Martin, farita buŝe al Amri en januaro, "duon-kanutigi" (pagi 50% de la baza kotizo) ĉ. 5 israelajn s-anojn (delegitojn?)

La venonta kunsido: 6-a de Majo 2019, 19:30

Protokolis: Amri